



الحقوق اللغوية ЯЗЫКОВЫЕ ПРАВА
DERECHOS LINGÜÍSTICOS
DROITS LINGUISTIQUES
语言权 LINGUISTIC RIGHTS



Universala Esperanto-Asocio, UEA
Alparolo dum la 7-a sesio de
Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP),
Palaco de Nacioj, UN, Ĝenevo, 7-11 julio 2014 - ĵaŭdo, 10-a de julio 2014.

Tagorda punkto 7: Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj

Sinjoro Prezidanto, karaj reprezentantoj de indiĝenaj popoloj, karaj partoprenantoj, saluton!

Mi nomiĝas [Stefano Keller](#), mi reprezentas Universalan Esperanto-Asociacion, la mondorganizaĵon de la parolantoj de Esperanto, la lingvo internacia, justa kaj neŭtrala, kiu ebligas egalrajtecon en la interreta komunikado.

Nia projekto *Indiĝenaj Dialogoj* estis kontribuo al justa solvo de la komunikado inter la popoloj indiĝenaj.

Rilate al *la lingvaj rajtoj de indiĝenaj popoloj*, la **Artikolo 13** de la **Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj** diras:

“1. La indiĝenaj popoloj havas la rajton revigligi, utiligi, evoluigi kaj transdoni al la sekvaj generacioj siajn historion, lingvon, parolajn tradiciojn, sian filozofion, siajn skribsistemojn kaj literaturon, same kiel elekti kaj konservi siajn proprajn nomojn por nomi la komunumojn, la lokojn kaj la personojn.

2. La Ŝtatoj devas certigi la efikan protektadon de tiuj rajtoj kaj certigi ke la indiĝenaj popoloj povu kompreni kaj estu komprenataj okaze de politikaj, juraj kaj administraciaj proceduroj, provizante, se necese, interpretajn aŭ aliajn adekvatajn servojn“ (fino de la citaĵo)

Biologiaj specioj, multaj lingvoj estas je risko de malapero. Perdiĝas la diversecoj biologia, lingva kaj la praulaj konoj pri naturo, vivo - kiuj ĉiuj estas dependantaj unu de la alia. Por gardi la biodiversecon, kiu estas necesa por nia pluekzisto, ni devas konservi ĉiujn lingvojn de la mondo, sed speciale tiujn de la indiĝenaj popoloj, ĉar la scioj necesaj por konservi la diversecon estas entenataj en iliaj lingvoj kaj kulturoj.

Sed, ni devas ne nur konservi tiun ĉi biokulturan diversecon pro ĝia neceso al nia pluvivo, *ni devas ankaŭ agi kun respekto al la homa digno, reciproke inter kaj al ĉiuj popoloj de la mondo*, ĉu temas pri etna grupo konsistanta el malmultaj membroj, ĉu pri alia, havanta milionojn da membroj, pli potenca, *evitante ke la pli potencaj trudu siajn lingvojn kaj kulturojn al la aliaj*.

La gepatra lingvo havas gravan kaj fundamentan rolon en la vivo de ĉiu homo, sed malgraŭ tio, la vortoj «lingvo», «gepatra lingvo» mankas el pluraj oficialaj dokumentoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Konforme al la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj, ni alvokas por inkludo en la oficialaj dokumentoj de la Monda Konferenco pri Indiĝenaj Popoloj (WCIP), de rekomendoj favore al la konservado, subteno kaj utiligo de la gepatraj lingvoj - sen forgesi la gestolingvojn - de indiĝenaj popoloj.

Dankon pro via atento - kaj same grandan dankon al la interpretistoj por ilia laboro.

www.linguistic-rights.org/esperanto-125

www.uea.org | www.esperanto.net | www.lernu.net | www.terralingua.org